

Bannickel

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 3

Majo/Junio 1969

Paskon en Strasburgo

Eksperimento kun scivolo atendita ne nur plene sukcesis, sed ĉiujn supozojn superis. Kiu do povas plendi pri organizaj mankoj antaŭ la fakto, ke — unika en la Esperanto-historio — la landaj asocioj franca kaj germana komune kongresis, eĉ arigis pli da kongresanoj ol sume la du opaj organizaĵoj en la lasta jaro. Sed nia raporto ne konsideras organizajn aferojn de GEA; tio estas tasko de la kongresprotokolo. Kvankam multaj germanaj vizitantoj bedaŭris la likvidon de la tradicia pentekosta kongreso, tamen al ni fervojistoj la paska kunveno donis konvenan okazon por diskuta kaj informata kunesto inter la respektivaj landaj jarkunvenoj kaj la IFEF-kongreso.

La impona domo de la universitata fakultato pri literaturo kaj humanaj sciencoj prezentis indan fonon kaj praktikan konstruaĵon por nia kongreso. Kiu, alveninte per fervojo, post unuhora marŝado tra pitorekscaj stratetoj kaj sur grandurbaj avenuoj serĉante la kongresejon, fine atingis la universitatan kvartalon, povis ekscii tie, ke en la turisma oficejo antaŭ la stacidomo deĵoras esperantistino. Same apud la rejnpointo servis turisma oficistino esperanton-parolanta, sed nur al tiuj aŭtomobilistoj, kiuj reveninte de la kongresdomo ne facile trovebla pro la interesa trafikregulado, sciis nun pri tia servo. Taksioferoj ŝajnis (aŭ ŝajnis) sin? kio neniel estas tipe franca) ne bone informitaj pri la situo de la demandita loko, favore al la taksimetro, kompreneble. Tiu kongresano, kiu post publika enketo tamen trovis la haltejon de la aŭtobuslinioj indikitaj en la kongresprogramo, laŭŝance povis tie konstati aŭ ne, ke la n-ro 20 jam ne veturas, la 42 nur sezone, kaj cetere morgaŭ ĉiuj strikos. Plej bone fakte funkciis la meteorologia servo de la LKK-prezidanto: akurate kun la unua kongrestago

aperis la promesita bela vetero kaj daŭris ekzakte ĝis la kongresfino.

Sabaton posttagmeze k-go Brandenburg povis saluti ĉ. 75 fervojistojn kaj interesitajn gastojn en la aŭditorio „Hermann“. Laŭprograme raportis pri la preparoj en Avignon k-go Motto, LKK-prezidanto de nia 21-a IFEF-kongreso. Multpromesa statistiko de aliĝoj, jen ĝis pasko: 19 landoj kun sume 442 aliĝintoj, el tiuj 66 el Germanujo kaj 64 bulgaraj; oni atendas i. a. ankoraŭ 30 bulgarojn kaj 50 ĉeĥoslovakajn kolegojn jam anoncintajn.

Post tiuj lastaj novaĵoj el la ĉi-jara ĉefurbo de IFEF k-go Brandenburg skizis la klerigajn taskojn de GEFA kaj IFEF kiel fakaj organizaĵoj. La turismaj aranĝoj de niaj kongresoj estas necesa kaj ŝatata akcesoraĵo. Tamen la maksimumo de faka organizaĵo devas havi fakan aspekton. Ekzistoj rajton kaj motivon al niaj fervojistaj kongresoj donas nur la faka laboro. Prelejoj, literaturo, terminara laboro reciproke sin inspiras kaj influas la lingvan nivelon en nia fervojista Esperanto-movado. IFEF jam tre frue ekkonis sian gravan rolon. Ĝiaj landaj asocioj, ĝiaj kongresoj, ĝiaj terminara kaj fakprelega komisionoj ĉiel akcelas kaj akcentas la multbranĉan faklaboron en ĉiuj sektoroj de nia profesia ĉiutago. Tia ĉi laboro unuarange decidis pri la reputacio de faka organizaĵo. K-go Brandenburg parolis i. a. pri la sistema evoluo de la fakprelejoj el raportado, fakaj ekskursoj, vizitoj al fabrikoj, riparejoj, regadejoj ktp. Ĉia faklingva agado premias ne nur profesiajn spertojn, sed ankaŭ lingvan perfektecon por manipuli respektivan terminaron kaj postulas daŭran atenton pri la faka kaj lingva evoluo.

Intertempe niaj francaj gekolegoj preparis son-bildprezenton pri Avignon, Rodano kaj Camargue. La varia historio de nia

kongresurbo nunjara respreguliĝas en ĝiaj interesaj konstruaĵoj kaj en la ĉarmo de la folkloro. La rivero kiel unu ĉefa arterio de la praepoka trafiko logis norden armeojn kaj koloniistojn; ĉiu tempo postlasis siajn ŝtonajn atestantojn. La potencaj akvoamasoj de Rodano dividiĝas en la mediteranea delto kaj ĝiaj brakoj ĉirkaŭas la sovaĝan pejzaĝon de Camargue, kien kondukos unu el la proponitaj kongres-ekskursoj.

Post la Fervojista Kunveno pli ol 50 ekzempleroj da ilustritaj prelegoj el Fulda kaj Varna trovis interesulojn.

La dimanĉa plenkunsido de GEA reprezentis 648 membrojn el ĉ. 1200. La cent aktivuloj ĉeestantaj relative rapide kaj konkorde plenumis siajn taskojn. K-go Ritterspach utiligis la okazon por konciza raporto pri la fakaj laboroj de GEFA. La reelektita prezidanto de GEA, d-ro Bormann, invitis por 1970 al Aachen, kie la jarĉefkunveno okazos probable kun la belga kaj nederlanda asocioj.

Lundon la kongresanoj ekskursis laŭ la Alzaca Vinstrato al Haut-Koenigsbourg, rekonstruita de la lasta germana imperis-

estro en mezepoka stilo, vilhelmece heroa, provoka, sur la plej alta krutaĵo en idilie monteta kamparo. Almenaŭ unu profitiga postlasitaĵo el la germana periodo, vera turist-melkilo. Dekmiloj da vizitantoj en tiu tago, ne preterpasebla serpento da ĉiaj motorveturiloj sieĝis la Altan Reĝkastelon. La aŭtobus-ŝoforo certe majstras sian metion. Tra timige malvastaj vilaĝaj stratoj la dekstra mano suverene direktas la monstron kaj ankoraŭ tenas la verdan Michelin-gvidlibron, la maldekstra estas okupita de la mikrofono kaj lia nazo vigle gestas tien — tien: ... „et à gauche sehet Sie ville Weinzer...!“ La lingvaĵo estas notinda; eble li volis komplezi al siaj gastoj per propra interlingvo. Ŝajnas ke nek la francoj komprenis la francan, nek la germanoj la germanan lingvon plu en tiu lando kun pripensiga historio de interhomaj kvereloj. „De 1908 mi deĵoras en la politiko, rakontis la urbestro dum akcepto en la urbodomo, kaj mi kvin fojojn ŝanĝis la naciecon, militservis jen kontraŭ mia franca, jen kontraŭ mia germana hejmlando — kaj ni volis nur pacon, ĝui la vivon kaj la vinon.“ wbr

Dekfoje Skisemajno en Aŭstrio

En belega montarregiono sur alteco de 1530 m situas Strussinghütte (super Werfenweng apud Bischofshofen), kie okazis de la 15a de februaro ĝis la 1a de marto la 9a kaj 10a Internaciaj Fervojistaj Esperanto-Skisemajnoj. La ĉi-jaraj aranĝoj altiris 17 germanajn samideanojn por komune kun amikoj el 5 aliaj landoj travivi unu semajnon aŭ eĉ du en vera internacia harmonio. Jam dekfoje tiun aranĝon organizis Johano Geroldinger el Linz, kiu per tiu senlaca laboro pruvus sian nevenkeblan idealismon por nia ideo. Vortoj ne taŭgas por danki al li, pro tio mi ĉi tie citu frazon el salutletero de emerita lerneja direktoro Josef Mráz: „... li estas ĝuste tiu, kiu pri la kreo de internacia amikeco ne parolis, sed fakte praktikadis ĝin“ — Kaj tion seninterrompe dum pli ol ses jaroj!

Modele redaktita kaj kartonita broŝuro kun 32 paĝoj, kiun la sinanoncintoj jam antaŭ ekveturo ricevis, ne nur informis pri la ĉi-jaraj programeroj, aŭtobusa kaj fervoja horaroj, poŝtarifoj, sed eĉ pri antaŭaj skisemajnaj rezultoj. Poemo de Johann Wieshofer honore al la jubilea IFES, kaj diversaj raportoj kompletigis la enhavon. El aparta tabelo oni povis legi, ke entute 426 esperantistoj el 13 landoj partoprenis tiujn skisemajnojn kaj aliloke oni vidis,

ke kelkaj samidenoj (ekz. Günther Doliwa, Jean Mevel kaj pluraj aŭstraj kolegoj) partoprenis eĉ ĉiujn 10 aranĝojn. Tiu fakto pli ol vortoj pravas la unikan karakteron de la pasintaj skisemajnoj kaj ĉi, kiu foje ĉeestis, ne plu forgesos la intiman atmosferon, kiu ĉiujare estiĝis en la internacia rondo.

Johano Geroldinger serĉis kaj trovis en belegaj lokoj kiel Landeck, Großarl, Krimml, Innsbruck kaj Werfenweng taŭgajn restadejojn por „siaj“ renkontiĝoj kaj la imponaj kaj majestaj montarregionoj esence kontribuis al efiko kaj sukceso de ĝis nun 10 skisemajnoj. Personoj de ĉiu aĝo grupiĝis ĉirkaŭ la organizinto kaj la skiinstruisto, ĉar skii kaj migri sur neĝkovritaj montoj kaj ĝoji pri natura beleco ne estas junulara privilegio, sed rajto de ĉiu homo.

Estus interese scii, kiom da pokaloj, medaloj, teleroj, libroj, broĉoformaj skiparaj kaj aliaj valoraj premioj Johano Geroldinger dum tiuj 10 semajnoj disdonadis. Sole dum la jubilea 10a IFES preskaŭ ĉiu, kiu partoprenis ski-, irad-, aŭ lingvokonkuron, povis hejmenporti valoran memoraĵon. Eĉ tiu, kiu foje skribis raporton pri IFES aŭ verkis poemon okaze de skisemajno estis honorita per bela gravurita tabloinsigno.

Pro vigla kunlaborado Josette Bernier el Parizo kaj Günther Doliwa ricevis oran memormedalono. Restos enigmo por ni ĉiuj, kiel li sukcesis akiri tiom da memoraĵoj per kiuj li ĝojigis multajn homojn. Ie oni povis legi, ke dum la 9a kaj 10a IFES la disdonitaj pokaloj kaj premioj portis 2707 gravuritajn literojn!

Per la 10a jubilea skisemajno antaŭvideble finiĝis la serio de vintraj refreŝig-renkontiĝoj en Aŭstrio. Kiu kuraĝas daŭrigi

la laboron de Johano Geroldinger, kiu kutime jam komencis labori por nova IFES, antaŭ ol la antaŭa finiĝis? Por 1970 Ĉeĥoslovakio estas aspiranto por la 11a IFES kaj ITALIO verŝajne respondecos por la 12a. Devizo estu laŭ la vortoj de Johano Geroldinger: „Nur gravas kie estonte okazos la IFES, nur gravas la bona kaj amikeca atmosfero!”

Elisabeth Ritterspach

Distrikt-komisiito en Essen
Jam dum pli ol dekedu jaroj nia kolego Alfred Schnetzer ne plu estas unu el la plej junaj fervojistoj kaj Esperantistoj.

La nun sesdekjaraĝa samideano eklernis la Internacian Lingvon 1950 en Bielefeld en la deĵorlando de nia pasinta prezidanto Gießner. 1954 foriris Gießner al Braunschweig kaj Schnetzer gvidis la fervojistan Esperanto-rondon kaj bone kontaktis kun la loka grupo. Post la transloĝiĝo al Essen en la jaro 1956 li transprenis la taskojn de distriktkomisiito kiel sekvanto de kolego Waldmann.

En 1959 li aranĝis kun la amikaj kolegoj la GEFA-jarkunvenon en Dortmund. Li estas membro de UEA

kaj IKUE dum longaj jaroj kaj partoprenis diversajn IFEF-kongresojn kaj GEFA-jarkunvenojn. Dum dekedu jaroj li inspiras la distrik-



Alfred Schnetzer

tan Esperanto-vivon inter la fervojistaj esperantistoj. La GEFA-membreco de 63 kolegoj en la distrikto Essen estas rimarkinda. Por flegi la internaciajn rilatojn li korespondas regule kun kelkaj Esperanto-fak-kolegoj. Dank' al siaj bonegaj kontaktoj kun la BSW-estraro en Essen li sukcesis ricevi regule monon por pligrandigi la bibliotekon de la distrikto kaj akiri kelkajn altvaloraĵajn objektojn (i. a. projekciilon kaj magnetofonon por la fervojista esperantistaro.

Pro tempomanko kiel staciestro de grandega stacio li ĝis nun bedaŭrinde ne faris ian ekzamenon; li ofte diras modeste kaj ruze pri si mem „mi estas la ĉiama komencanto”.

Imitinda ekzemplo

Vojaĝante en trajno Ulm - Friedrichshafen oni neniam supozas, ke en Laupheim West la alvenintaj pasaĝeroj estas akceptataj flanke de la fervojo per la vortoj: „Bonvenon en Laupheim”. Tamen tio okazis al la partoprenintoj de la distriktkunveno Stuttgart la 8an de marto. Ili venis de ĉiuj flankoj al la invito de nia kolego kaj distriktkomisiito Egon Kiefer. 50 personojn li povis bonvenigi en la restoracio en la Rabenstrato. Inter ili troviĝis BAmann Braun de la BSW distrikto Stuttgart. La fakto, ke la novfondita grupo Laupheim kuraĝis organizi

distriktan kunvenon, estas tiom gojiga afero, ke ankaŭ la GEFA-prezidanto Brandenburg delegis S. inon Kruse kiel estraran reprezentantinon. Si same salutis la ĉeestantojn en la nomo de la IFEF-estraro kaj donis detalajn klarigojn pri la 21a kongreso en Avignon, atentigis pri la franca-germana kongreso en Strasburgo, pri la trlanda renkontiĝo en Rommshorn kaj pri la GEFA-jarkunveno en Augsburg. La du ĉeestantaj ĵurnalistoj sin montris surprizitaj pri la vere funkcia lingvo kaj spontanee deziris sukceson kaj favoron en la poresperanta agado. La lumbildprelego pri Ontario

(Kanado) bone preparita kaj prezentita de S. ino Wilma Eichholz, Quebec, forkondukis la gastejojn por 1½ horoj en tute alian regionon de la mondo kaj vekis ĉe la spektantoj la deziron vojaĝi en tiun parton de la terĝlobo.

Marianne Braun kantis modkantojn kaj rikoltis aplaŭdon. Ankaŭ la akordeonludo de S. ro Bardecke estis plaĉa. La orkestro Mess zorgis, ke la dancemuloj moviĝis kaj amuziĝis. Ili eĉ faris tion senkosten (jes, tiaj idealistoj ankoraŭ ekzistas). Inter la grupmembroj estis kelkaj, kiuj ĵus estis revenintaj de la internacia skisemajno en Werfenweng. Kun gran-

da entuziasmo ili rakontis pri siaj travivaĵoj kaj pri la amika atmosfero, kiu estas karakteriza por tiaj aranĝoj. La filmprezentado estis pruvo por la aserto. En la jarraporto kolego Kiefer donis superrigardon pri la evoluo kaj la agado en la distrikto Stuttgart. Oni spertis, ke la grupo Laupheim post unujara ekzisto duobliĝis. Oni povas gratuli al S.ro Jochham same kiel al S.ro Kiefer, ĉar tio estas la rikolto de iliaj penoj.

Ni deziru al ili „Daŭrigon en la sama senco“!

La aranĝo estis sukcesplena kaj ĉiuj estis interne kontentaj pri la bona harmonio. E. K.

Moderna interlingvistiko

La ministro por eksteraj aferoj de iu novfondita afrika ŝtato aviadite venis al Londono kaj estis akceptata de ĵurnalisto.

„Ĉu vi havis agrablan flugon?“ la diplomato etis demandita. La nigra viro en bontajlorita vestaĵo donis de si vico da raŭkaj sonoj - trumpetis, pepis, vokaĉis, fajfis, longe siblis - kaj poste li respondis en bonega angla lingvo „dankon, bonege!“

„Kaj kiom longe vi deziras resti ĉi tie?“ demandis la ĵurnalisto. La viro el afriko denove aŭdigis la tutan serion de siaj sonoj. Tiam li diris: „eble unu semajno“ „Mi petas vin diri al mi“ esploris la konfuza raportisto „kie vi tiel flue lernis la anglan lingvon?“, Post la nun jam kutimaj antaŭpreparoj - respondis la afrika diplomato: „el la kurtonda sendaĵo de londona radio.“

Tradukis: E. Kruse

Praktikadon akcelu!

Kiel interesi la publikon pri Esperanto, kaj antaŭ ĉio, kiel uzi kaj uzigi Esperanton en la praktiko, pri tio dek fojojn jare informas IOE-Gazeto. Ne povas esti dubo: tiu faktoro, la praktika uzado de la Internacia Lingvo, estas unu



maldekstre: Kvarkolora aŭŝo, ĉ. 40x50 cm, invitas al partopreno en la nunjara IFEF-kongreso.

el la plej gravaj por la progreso de Esperanto. Ni ja bone scias, ke la plej multaj homoj nur tial ne emas lerni Esperanton, ĉar ili ne vidas eblecon por tuj

praktike utiligi ĝin por siaj celoj kaj intereso. Pro la sama kaŭzo ne malmultaj homoj, lernintaj Esperanton, baldaŭ forlasas la aferon konstatinte, ke ili ne povas uzi ĝin en sufiĉe kontentiga amplekso. Veraj idealistoj estas raraj, kaj eĉ idealistoj ne ĉiam povas agi, kiel ili ŝatus, ĉar ankaŭ ili devas vivi kaj fronti al la malfacilaĵoj de la vivo. Ni bezonas idealistojn por efektiviĝi la noblajn pensojn de Zamenhof, sed ni ankaŭ bezonas homojn, kiuj uzas Esperanton sen idealismo, se ni volas baldaŭ atingi nian celon idealisman.

Praktikuloj kaj praktikantoj povas aboni IOE-Esperanto-Gazeton pagante 8,50 GM poĵare al poŝtĉekkonto 1154 71 PSA Karlsruhe je la nomo Manfred Führer, 334 Wolfenbüttel.

Faklingva Angulo

redaktita de G. Ritterspach (Daŭrigo 1)

Ĉu vi bone digestis la unuan porcion da „faklingva salato“? Mi esperas ke jes kaj proponas resti ĉe la tri terminoj relo — ŝpalo — trako, ĉar de ili ori-



Medalo por Helmut Sikor, Karlsruhe (paĝoj 2/3).

ginas multegaj ĉiutagaĵoj en la fervojista mondo.

Ĉiu fervoja relo havas relpiedon (Schienenfuß), relalmon (Steg) kaj relkapon (Schienenkopf) kun la rula relsurfaco (Schienenlauf-fläche). Ĉe mezur-indikoj gravas la relsupronivelo (Schienenoberkante) kaj kie unu relo finiĝas kaj la sekvanta komenciĝas estas reljunto (Stoß). Relrompiĝo (Schienenbruch) estas tre danĝera kaj malfacile trovebla, precipe je la relsplint-sidejo (Laschenkammer). Tial oni ultrasona aŭskultumas la relvojojn per trakesplorvagono (Gleis-messwagen), kondukante relsondilon (Prüfkopf) proksime laŭlonge la relojn. Samtempe oni konstata la permeseblan reltriviĝon (zulässige Schienenabnutzung).

Tre komplikaj vortoj, ĉu ne? Jen kelkaj pli simplaj: relvojaro = Eisenbahnnetz, relvoj-aligo = Gleisanschluss, (Anschlussgleis = privata aligtrako), relvoj-distrikto = Bahnmeisterei (bezirk), relvoj-gardisto = Bahnwärter, relvoj-nodo = Eisenbahnknotenpunkt, dereliĝi (aŭ malpli bone dereliĝi) = entgleisen, relnivela krucejo = schienengleiche Kreuzung.

Pri ŝpalo ne tiel multaj derivaĵoj estas konataj. Ekzistas lignoŝpaloj, ŝtalŝpaloj kaj ferbetonaj ŝpaloj. Lignajn ŝpalojn oni impregnas antaŭ ol sterni (verlegen) ilin. Gemela ŝpalo (Zwillingsschwelle) ofte subportas surŝpalan reljunton, interŝpala reljunto ankaŭ nomiĝas kantilevra reljunto (schwebender Stoß). Ŝpalkrampo, ŝpálnajloj kaj ŝpalsraŭbo estas relfiksiloj, loj.

Per ĉiuj eblaj derivaĵoj de trako oni povus pleniĝi tu-

tan Bultenon, mi klopodos elekti la plej konatajn kaj gravajn. Simpla trakforko (einfache Weiche) konsistas ĉefe el 1 pintrelparo (2 Weichenzungen), movigeblaj sur pintrel-glitplatoj (Gleitstühle), el interreloj (Zwischenschienen), frogo (Herzstück), kontraŭfrogoj (Flügel-schienen), kontraŭreloj (Radlenker), la komutmekanismo (Antrieb) kaj pintrel-riglilo (Spitzenverschluß). Trakforkisto (Weichenwärter) komutas trakforkojn. Trakoj, trakforkoj kaj trakkrucaĵoj kune estas la relvojo.

Ekzistas subtrakaj pasejoj (Unterführungen), supertrakaj pasejoj (Überführungen, Viadukte) kaj transtrakpasejoj (Bahnübergänge). Multaj stacioj disponas pri entraka pesilo (Gleis-waage); en modernaj manovro-stacioj oni trovas trakbremsojn (Gleisbremsen) por ekzakte haltigi varvagonojn derulantajn de ordigmento (Ablaufberg). Ne intermiksi trakbremson kun magneta relbremso (Magnetschienenbremse), trovebla ekzemple ĉe trakbuso (Schienenbus). Ankorau io el manovra stacio: alven-trakaro akceptas la trajnojn tie, trakĝibo estas la nomo por malgranda ordigmento (Eselstrücken).

En moderna trakpanela regadejo (Gleisbildstellwerk) la trakliberec-kontrolinstalaĵo (Gleisfreimeldeanlage) ludas gravan rolon. Kiel trajnekspedisto (Fahrdienstleiter) tie mi laboris plej ofte laŭ trakokupiĝ-grafikaĵo (Gleisbesetzungsplan). — Multaj traklaboristoj loĝadas en traklaborista vagonaro (Gleisbauzug). Al iliaj taskoj apartenas trakprizorgado aŭ ripar-subtenado (Unterhaltung) kaj purigado de trakbalasto (Bettung) per grandaj

maŝinoj, unu traksekciojn post alia. Nepran finon certigas trakfina bufrobloko (Prellbock).

(Daŭrigota)

La signifo de traktemperatura por konstruado kaj prizorgado de senbreĉaj trakoj.

Esence grava por la aplikado de senbreĉe velditaj reloj en fervoj servo estas la problemoj kiel atingi respektive konservi la neŭtralan, indiférantan temperaturon, ĉe kiu la kunveldita traksekcio estas sen streĉiĝoj. Per mezuradoj oni konstatis, ke temperaturŝanĝo je 1° C rezultigas fortoŝanĝojn je 3 tunoj. La estiĝo de la ĝusta temperaturstato influas multegaj faktoroj; ĉe la konstruado: la metodo de la sternado ĉu helpe de arganoj, ĉu helpe de pulioj, ĉu oni kunveldas post la sternado, ĉu kombinita metodo; dum funkciado: la ombro de parkitaj vagonaroj, la dumtaga moviĝo de la sunombroj, eventuala relrompiĝo ktp. Plenan atenton oni devas direkti al la temperaturkondiĉoj dum trakprizorgado: rilate al labor-komenco kaj ŝanĝiĝo de la fortostreĉoj enrelaj, rilate al traksideja rezisto, al laŭlonga rezisto kaj rilate al la diferencoj de la fortostreĉoj en ambaŭ reloj de la trako.

(Laŭ DB-Dokumentationsdienst D 2443 tradukis Ritt)

Frankfurt/Main

Kolego Otto Denk, emerita GEFA-kasisto, gvidas elementan kurson en la popolaltlernejo de Offenbach/Main. Unuan fojon tiu institucio enkondukis Esperanton en sian programon.

Aus den Gruppen

Wuppertal

An der Jahresversammlung am 10. 2. 69 in Hagen/Westf. beteiligten sich etwa 20 Teilnehmer unseres Bezirks. Nach dem Tätigkeitsbericht des Bezirksbeauftragten und einer Koordinierung der diesjährigen Arbeiten, haben wir Farbdias der vergangenen Kongresse betrachtet und einige fröhliche Stunden miteinander verbracht.

REVELO invitis al jara ĉefkunveno la 16an de marto en Solingen. Unu semajnon antaŭe la invintinto Richard Galle mortis subite. Akceptante diversajn proponojn kaj sugestojn la 25 partoprenintoj elektis la estraron, kiel novan prezidanton s-ron Richard Müller, Köln-Flittart. Nome de GEFA salutis la komisiito Wuppertal, s-ro Graß, la konatajn aktivulojn el Nordrejn - Vestfalio kaj GEA-sekretario Pickel el Nürnberg, precipe en la nomo de la aktivaj gekolegoj el la respektiva REVELO-regiono, nome la distriktoj Essen, Hannover, Köln, Münster kaj Wuppertal. Li akcentis la korporacian membrecon en GEA, la lernigan kaj fakprelegan laboron kaj fine li invitis la ĉeestantajjn fervojistojn, inter kiuj estis nia plej maljuna aktiva membro Bulla el Recklinghausen, kaj aliajn teknike interesitajn REVEL-anojn al la fak-kunsido en Strasburgo (dum GEA-kongreso) kaj al IFEF-kongreso en Avignon. La aŭtuna REVELO jarkunveno okazos, laŭ invito de GEFA-distrikto, en Hagen/Vestfalio. Kun subteno de la loka fervoja Esperantogruppo oni planas varbkampanjon por gajni interesojn kaj eventuale novajn membrojn por ambaŭ organizoj.



Esperantogruppe Hagen/Westfalen

Stuttgart

La 14-an de Februaro 1969 nia aktiva kaj fidela membro, BBI Willi Schmid ĉe la Ps-Büro de BD Stuttgart festis sian 40-jaran deoran jubileon.

Dum la solenaĵo ankaŭ la distriktkomisiito por Esperanto en BSW, distrikto Stuttgart, bondeziris esperantlingve en la nomo de la Esperantogruppoj kaj transdonis kiel donacon la diskon „jen nia mondo“.

Ni dankas al nia kolego Schmid pro lia fideleco kaj pro lia helpemeco kaj deziras: ankoraŭ longtempe estu inter ni!

Anoncoj

Hispanio

Foiro de Barcelona
Esperantlingvan afiŝon petu de: Foiro de Barcelono, Avenida de Maria Cristina, Barcelona-4/Hispanujo.

Italujo

Multnombraj studentoj de la popola universitato el Trapani deziras korespondi. Skribu al: Esperanto, Casella Postale n. 23, I-91100 Trapani/Italujo.

Essen

Dank der Initiative unseres Kollegen Günter Bartz konnten im Auslandsinstitut Dortmund der Rheinisch-Westfälischen Auslandsgesellschaft e. V. in den Monaten März/April 1969 drei Esperantoveranstaltungen durch das monatlich erscheinende Programm angekündigt und durchgeführt werden. Der Esperanto-Kreis trifft sich außerdem regelmäßig montags um 18 Uhr in der Arndtstraße in Dortmund.

deziras korespondi

Korespondadon kun germanaj fervojistoj serĉas s-ro Ladislav Lan, Nohova 6, Plzen/CSSR. Li kaj sia edzino estas IFEF-anoj (26 kaj 28); ambaŭ trapasos en majo 1969 Germanujo kaj serĉas kontakton kaj intencas redoni eventualan gastemon.

Pli ol 30 koresponddeziroj ricevis k-ron Kiefer en Stuttgart el Ĉeĥoslovakio. Li mem kaj la grupoj el distrikto Stuttgart ne povas korespondi kun ĉiuj interesuloj. Se vi havas intereson skribu aŭ telefonu al: BOI Kiefer, BD Stuttgart — Ps-Büro —; Basa 952/5625.

Redaktfino por n-ro 4 estas la 10a de junio 1969.

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main).
Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen-Ohligs, Meteorstraße 13. Druck/preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.